

Sekso kaj Egaleco

Numero 7
Julio 1981

Sendependa
novaĵletero

KIO PLI URĜAS?

"Kion vi opinias: ĉu virina emancipiĝo aŭ ĉu solvo de la problemo pri senlaboreco estas pli grava?" Ĉu oni iam tion demandis al vi dum diskuto pri emancipiĝo, aŭ ĉu eble vi mem vin demandis? Se la demando estas tiel formulita, la pli-multo el ni emus respondi, ke solvo de tiuj gravaj problemoj kiel manko de laboro, ĉesigo de militoj, liberigo de nacioj, estas certe pli urĝa ol edukado de virinoj, provizado de infanvartejoj, batalo kontraŭ stereotipoj ktp.

Sed ŝajnas al mi, ke la demando estas erare formulita. Ĝi estas bazita sur la sama eraro, kiu kaŭzis ke nun, ses jarojn post la malfermo de la Internacia Jardeko de la Virino kaj post du internaciaj konferencoj, oni ankoraŭ ricevas la oftan impreson ke nenio baza ŝanĝiĝis. Ekzistas tri novaj infanvartejoj kaj eĉ unu telefon-teknikistino, sed la ĝenerala mensostato restas sama. Pri tio kulpas la vorto "emancipiĝo", kiel ĝi estas nuntempe uzata. Per aparta vorto por virina emancipiĝo, oni kreas la impreson, ke temas pri aparta problemo, problemo nur de virinoj. Sed ĝi estas simptomo de nuntempa pensomaniero ĝenerala, kiu estas teknokrata kaj mal-humanisma.

"Emancipiĝo" ekiĝis en la 18a jarcento, en la humanisma tradicio. Ĝi signifis estimon por la homo, kaj rezultis en pligrandigo de toleremo kaj batalado kontraŭ antaŭjuĝoj (ekzemple per leĝa egalrajteco por judoj). Mi ŝatus revoki tiun uzon de la vorto "emancipiĝo", laŭ kiu centra estas la valoro de la homo.

Sekso kaj Egaleco

Redaktoro

Anna Brennan
p/a Nieuwe Binnenweg 197B
3021 GA Rotterdam
Nederlando

Sendependa novaĵletero

Jarabono (4 numeroj):
12,00 gld. aŭ 15 irk.

Internaciajn respondkuponojn
sendu rekte al Anna Brennan,
aŭ pagu al ŝia nederlanda
poŝtĉekkonto 4412211.

Limdato por la venonta
numero: 15a de septembro.

Kunlaborantoj en ĉi tiu numero:

Audrey C.E. Childs-Mee
Loes Demmendaal
Judith Junger
Lembe Laanest
Charles Power
Dermod Quirke
Lu Wunsch-Rolshoven

Presis Strangled Vole Press en
London, Britio.

Perantoj

Internacia (prezo: 14,50 ned. guldenoj): Universala Esperanto-
Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.
Poŝtĉekkonto 378964 (UEA). Banko: Mees & Hope, Coolingsel 93,
3012 EA Rotterdam (konto 25.52.89.804).

Argentina: Hugo A. Lingua, Casilla de Correo 278, 2000 Rosario.

Brita (prezo: 3,00 britaj pundoj): Dermod Quirke, 18 Trouville
Road, London SW4 8QL. Poŝtĉekkonto 12 463 0006.

Franca: Anne Elise Amblès, 51 rue Blanche, 75009 Paris.

Germana (prezo: 12,00 germanaj markoj): Lu Wunsch-Rolshoven,
Gerichtstr. 43, 2000 Hamburg 50. Poŝtĉekkonto Hmb.4168 27-201.

Itala (prezo: 5600 liroj): Alessandro Panerai, Via Pistoiese
N457, 50010 Campi-Bisenzio.

Japana (prezo: 1500 enoj): Hukunaga Makiko, Midori-so 2-1,
Kamisyakuzii 1-739, Nerima-ku, Tôkyô, 177. Girokonto 0-99911,
Tôkyô.

Norvega (prezo: 30,00 norvegaj kronoj): Margrete Landmark,
Buerstad, 3135 Torød. Poŝtĉekkonto 5 73 61 29.

Novzelanda: J. T. Allan, 12 Lonsdale Crescent, Wellington 3.

Sveda (prezo: 25,00 svedaj kronoj): Märtha Andreasson, 2265
Tolsered, 425 90 Hisingskär. Poŝtĉekkonto 27 01 04-4000.

Usona (prezo: 6,50 usonaj dolaroj): Charles Power, Nieuwe
Binnenweg 197B, 3021 GA Rotterdam, Nederlando. Pagaĵo per
ordinara usona enlanda ĉeko al la nomo Charles Power.

Sekvante la evoluon de la eŭropa kulturo de la 18a jarcento ĝis nun, tra la industria revolucio, la du mondmilitoj, politikaj ŝanĝoj, scienca kaj industria evoluo ĝis la nuna bonfarto, ŝajnas ke ju pli oni evoluas, des pli oni mal-humaniĝas; des pli homoj iĝas iloj servantaj politikan fanatikecon kaj mem-detruan industriismon. (Ni konsideru nur la enorman ekologian damaĝon kaŭzitan per la industria malpurigo). Tiu kulturo, precipe la okcident-eŭropa kaj usona, ne estas ateisma kiel oni emas kredi. Nia religio estas la abundo kaj konsumado, la iamajn ĉefpastorojn anstataŭas la direktoroj de la multnaciaj firmoj (Esso, Shell, Ford, Mobil Oil ktp), kaj oni eĉ daŭrigas la kutimon de homaj oferoj: oni oferas la homan dignon kaj la mensan sendependecon. Ni konkurencas por eĉ pli da riĉeco, kaj dumvoje, uzas la pli malfortajn: evolu-landojn, etnajn minoritatojn, virinojn.

Emancipiĝo postulas unue ŝanĝi tiun sintenon. Post tia ŝanĝo oni mem vidos ke virinoj, same kiel homoj el aliaj kulturoj, ja estas samvaloraj. Oni vidos ke la problemoj ne temas pri tri novaj infanvartejoj kaj telefon-teknikistino, eĉ ne pri virinoj mistraktitaj de la edzo. La problemoj de virina emancipiĝo estas problemoj de la tuta homaro. Ĝi estas simptomo de pensomaniero ĝenerala. La problemoj pri la rajtoj de virinoj labori eksterhejme, ricevi egalan salajron kiel la viroj, ne distingiĝas de la ĝenerala problemoj de ekspluatado de laboro. (Ekzemple, oni scias, ke la plej granda parto de la teksaĵ-industrio de okcident-Eŭropo troviĝas nuntempe en Tunizio kaj Maroko, ĉar tie oni malpli pagas al la laboristoj, kaj do la sinjoroj industriistoj havas pli altan gajnon.) La problemoj pri egala edukado por virinoj konsistigas, ni diru, 40% de la problemoj de diskriminacio en edukado, kiu funkcias ankaŭ kontraŭ la malriĉaj klasoj kaj la etnaj minoritatoj.

Kiam oni rigardos egalecon inter homoj kiel naturan oni ankaŭ ne diskriminacios en laboro kaj edukado. Ekzemple kiam mankas laboro, oni ne aŭtomate forsendos la edziniĝintajn virinojn, sed ĉiuj pli malmulte laboros. Tiam ankaŭ viroj povus resti hejme kaj ĝui la edukadon kaj evoluon de siaj infanoj, do ili egale al virinoj partoprenus en la familio kaj ĝiaj plezuroj. Aŭ, kiam la celo ne estos grandigi la konsumadon, ankaŭ ne necesos la frenezaj klopodoj vendi novan tipon de veturilo (kiu tute similas al la jam estantaj), per reklamo en kiu troviĝas duone nuda virino.

Multaj aliaj ekzemploj povus montri, ke la virina emancipiĝo postulus tre fundamentan ŝanĝon en tiuj sintenoj, kiuj aktuale respondecas pri ĉiuspecaj problemoj: diskriminacio, ras-apartismo, milito ktp.

Do, kiam oni venontfoje demandos al vi, ĉu pli gravas la virina emancipiĝo aŭ solvo de la problemoj de senlaboreco, milito kaj ekspluatado de malriĉaj landoj, ne falu en tiun kaptilon. Ne riproĉu vin, ke vi insistas pri bagatelaĵoj dum tiuj gravaj problemoj restas ne solvitaj, ĉar ili tute same formas la problemon de emancipiĝo.

Judith Junger ♀, Nederlando

ARĤIVO DE PRELEGOJ

En prelego al la 22a Aŭstralia Esperanto-Kongreso en Sidnejo, Jacqueline Walker ♀ (ĝaklin ŝokr) rapide trarigardis la historian situacion de virinoj precipe en la okcidenta socio kaj Aŭstralio. En fruaj socioj, difinitaj seks-roloj necesis, kiel ekzemple ĉe la primitiva socio de Aŭstralio. La pli forta viro ĉasas bestojn por manĝaĵo, dum la virino naskas kaj prizorgas infanojn kaj serĉas akvon, radikojn kaj manĝeblajn plantojn. Infanoj bezonas lerni nur la lertojn kiuj apartenas al la propra sekso.

Nun virinoj gajnis multajn rajtojn, tamen la problemoj ankoraŭ ne estas tute solvitaj. Kvankam la vojoj estas malfermitaj, en Aŭstralio io malhelpas, ke la virinoj sekvu ilin. Ekzemple en la universitatoj malmultaj virinoj studas en inĝenieraj, sciencaj kaj medicinaj fakultatoj. Difinitaj okupoj estas anoncitaj precipe por viroj, kvankam ambaŭ seksoj facile povus fari ilin. Estas malmultaj virinoj en la Senato kaj la Ŝtataj Parlamentoj, tiel ke tiuj institutoj ne reprezentas la seksan proporcion de la popolo. Tio okazas, ĉar oni ankoraŭ edukas la homojn kredi ke "la justa ejo por virino estas la hejmo".

La kompleta teksto de ĉi tiu prelego aperis en la decembra numero de The Australian Esperantist. Ĝi estas havebla de la arĥivo de KVA (vidu p. 7).

Por la bono de la mondo...

Sybil V. Sly ♀ (sibil slaj), Britujo

... la bono de la mondo kaj la celo de paco postulas la maksimuman partoprenon de virinoj egalbaze kun viroj en ĉiuj kampoj

(el la enkonduko al la Konvencio pri la Forigo de Ĉiuj Formoj de Diskriminacio kontraŭ Virinoj)

Se vi deziras labori por pli paca kaj justa mondo sen la amasdetruaj armiloj, kiuj nun minacas la vivon de la tuta homaro, okazo jam urĝe prezentas sin. La Kampanjo por Monda Malarmado celas kolekti milionojn da subskriboj tra la tuta mondo por Petskribo, kiu estos prezentita al la registaroj kaj al la speciala sesio de la Unuiĝinta Naciaro pri Malarmado en 1982. La teksto en Esperanto troviĝas en p. 6.

Eble vi jam kunlaboras pri la kampanjo en via propra lando. Bone! En Britio ni celas starigi komitatojn en ĉiu distrikto, kies reprezentantoj sisteme vizitos ĉiujn domojn por kolekti subskribojn. Ni montras filmon - rifuzitan de la nacia televida stacio (BBC) kiel tro timigan - pri la terura efiko de nukleaj bomboj. Precipe la gejunuloj forte interesiĝas kaj promesas helpi pri la kolektado de subskriboj. Britio ja estas tiel dense enloĝata, ke en nuklea mondmilito ĝia popolo verŝajne grandparte pereus. La Kampanjo havas la subtenon ankaŭ de vasta aro da organizaĵoj, politikaj, sindikataj, virinaj, studentaj, religiaj, ktp.

Kelkaj el ni, esperantistoj, opiniis, ke valoras havi Esperantan version de la Petskribo, kiun ni povas distribui tutmonde. Mi do faris tradukon kaj oni povas peti presitan petskribo-formularon de mi (200 Nevells Road, Letchworth, Herts., Britio SG6 4TZ) aŭ de s-ro P. Hewitt, Laycroft, Main Road, Covenham, Louth, Lincs, Britio LN11 0PF (respondukuponon mi petas!). Aŭ vi povas mem kopii la tekston sur

paperfolion A4 (grandeco de malfaldita SkE) kun lokoj por precize 20 subskriboj kaj adresoj sube. Multobligu aŭ presigu laŭbezone! Vi povas traduki ĝin en vian propran lingvon kaj peti subskribojn, eĉ pli bone, aliru pacorganizojn en via lando kaj demandu, ĉu oni jam kunlaboras. (Informojn diverslingvajn petu de World Disarmament Campaign, 21 Little Russell Street, London WC1 4HF). Ankaŭ skribu al viaj alilandaj geamikoj pri la afero.

Sajnas al mi ke jen okazo por la popoloj de la mondo montri, ne nur al la registaroj kaj UN, sed ankaŭ al la aliaj, ke ni ja deziras racie uzi la rimedojn de la tero por pli bona vivo (plej grave por la malriĉaj nacioj), ne por minaci unu la alian per teruraj armiloj. Por la esperantistoj jen okazo montri nian internacian solidarecon kaj kapablon labori mondscale.

Jam kunlaboras en Britio Kvakeraj Esperantistoj, Mondpaca Esperantista Movado, Sennacieca Asocio Tutmonda kaj membroj de la Asocio pri Unuiĝintaj Nacioj. Ni petas vian amasan subtenon.

SERVO DE KVA:

ARĤIVO PLILARĜIGAS SIAN CELON

Pli frue ni anoncis, ke ni kolektas pretajn prelego-tekstojn pri la situacio de virinoj, por helpi estontajn parolantojn. Nun ni decidis kolekti ĉiajn materialojn pri tiu temo, ne nur prelego-tekstojn.

Se vi havas tekston kiu povus esti interesa por la arĥivo (aŭ kompletan aŭ en la formo de notoj), bonvolu sendi ĝin al la redakcia adreso. Prefere aldonu unu-alinean resumon por kreata indekso.

La arĥivo estas ankoraŭ malgranda - sed rapide kreskas! Informoj pri havebla materialo aperas en SkE (ĉi-numere vidu p. 4 kaj la artikolon en p. 14-15).

Ĉar temas pri senpaga servo, bonvolu peti tekstojn el la arĥivo nur se vi efektive intencas utiligi ilin. Laŭeble aldonu 3 irk. por la afranko.

Virinoj kaj laboro

JAPANUJO

(Ĉi tiu raporto, kiun ni iom malplilongigis, troviĝas en la dokumento "Diversaj aspektoj de diskriminacio en Japanujo", kompilita de Umeda Joŝimi *ŝ.* Por detaloj, vidu la antaŭan numeron de SkE.)

Mia laborejo estas la plej granda asekura entrepreno el ĉiuj fajro-asekuraj kompanioj en Japanujo, kaj pro tio altiras multajn studentojn ĉiujare kandidatiĝi por enposteniĝo. En la sezono por rekruti novajn laboristojn, la nomo de nia kompanio ĉiam vicas unua en la listo de rekomendataj kaj aspirataj entreprenoj por universitataj studentoj.

Teorio kaj realeco

En la kompanio laboras ĉirkaŭ 7 000 homoj, el kiuj 4 000 estas virinoj. Tamen, el tiom da virinoj nur 26 povis akiri la postenon de sekciestro kun iaj respondecoj. Tiun ĉi postenon atingas kutime viraj laborantoj 6 jarojn post la dungigo, proksimume je la aĝo de 28 jaroj, sed por tiuj virinoj kiuj ricevis tiun respondecan postenon necesis 20 jaroj da laborado kaj tial plej multaj el ili aĝas ja 40 jarojn kaj pli. Kaj nur du el la 26 sekciestrinoj estas edzinoj. Atinginte la postenon, per kiu ili povas regi aliajn multajn virinojn kiel siajn subulojn, ili tamen devas ankoraŭ pli severe laboregi ĝis la retiriĝa aĝo de 55 jaroj. La viraj laborantoj estas pli favorataj ankaŭ tiusence, ĉar ili atingas la saman postenon pli frue ol virinoj kaj plu promociiĝas al pli altaj postenoj, dum por la virinoj la sekciestreco estas preskaŭ la fina posteno.

Teorie la salajra sistemo de nia kompanio donas egalan rajtecon al ĉiuj laborantoj senkonsidere pri la sekso kaj edukado, sed efektive ekzistas diferenco laŭ la aplikado de diversaj subpagoj. Ekzemple, laŭ la grado de edukado troviĝas tia diferenco: Viro, kiu diplomiĝis 22-jaraĝa el universitato, ricevas por la unua jaro 128 700 enojn kiel monatan salajron. Virino, kiu diplomiĝis 20-jaraĝa el kolegio, ricevas 101 200 enojn kiel monatan salajron, kaj pli juna virino fininta altlernejon je la aĝo de 18 jaroj ricevas nur 95 700 enojn monate. Tiu diferenco daŭras ĝis la retiriĝa jaro. Salajro por viro pli multe altiĝas jaron post jaro; alie, por virino la altiĝo estas ne ĉiam samnivela. Pro tio okazas tia diskriminacio, ke iu virino, kiu gvidas novican viron, ricevas malpli da salajro ol tiu viro ricevos post du-tri jaroj.

Ankoraŭ pli...

Ankoraŭ pli da diskriminacio ekzistas. En la oficejoj viroj kaj virinoj faras samajn ĉetablajn laborojn. Kiam virino telefone parolas kun iu kliento, ŝia kontakto estas konsiderata kiel "alĝiro", sed por la samspeca dialogo viro ricevas pli bonan takson de "negoco", tiel ke la poentoj en pag-sistemo, kiu baziĝas sur kapableco, estas determinitaj pli favore por viroj ol por virinoj.

Aliajn malegalaĵojn inter viro kaj virino mi citu jene: Viro ricevas pli multajn aldonaĵojn al la baza salajro, ekzemple familisubtena aldono, loĝeja aldono, kromlabora aldono, pensia aldono, veturkostoj, ktp. Por la bonfarto kaj refreŝigo de la laborantoj nia kompanio havas diversajn instalaĵojn kiel banlokajn ripozejojn kaj sportejojn, kaj ĉiuj kompanianoj rajtas uzi ilin per egala pago de la kotizoj. Tamen por iliaj familianoj la kotizoj estas malegalaj inter familianoj de viraj laborantoj kaj tiuj de virinaj laborantoj.

Konklude...

Okaze de la Internacia Jaro de la Virino en 1975, aŭdiĝis ankaŭ en Japanujo la postulo pri egalrajteco inter viroj kaj virinoj. Samtempe, tamen, kapitalistoj utiligis tiun

postulon por ŝanĝi diversajn normojn reguligitajn laŭ la laborleĝoj por pli multe dungu virinojn en siaj entreprenoj.

Japaninoj, kiuj volas labori eksterdome, devas samnivele plenumi la taskojn kiel viroj, malgraŭ tio ke viroj ricevas pli favorajn kondiĉojn rilate al salajro kaj aliaj avantaĝoj. Nur tiaj virinoj estas alte taksataj. En la asekura industrio, ekzemple, tre gravas tielnomataj ŝetablaj laboroj, kiuj estas plejmulte plenumataj per la manoj de inaj laborantoj. Kompletigo de la poliso, klasigo de la statistiko kaj aliaj tiaj taskoj estas neignoreble gravaj, sed nur pro tio ke ili aspektas simplaj kaj facilaj, oni taksas ilin kiel porvirinajn. Virinoj serioze plenumas tiujn taskojn tagon post tago, jaron post jaro. Ni do rajtas postuli la saman pritrakton kiel viroj. Ni volas vivi kiel homoj. Estas senduba fakto, ke japanaj viroj laboregas, sed ankaŭ virinoj formas socian elementon.

Huzisima Tosiko ♀

SVEDUJO

En Svedujo, ekzistas 300 diversaj profesiaj kampoj en kiuj oni trovas virojn. Sed 11% el la virinoj troviĝas en nur 11 profesioj - unuavice en tiuj, kie ili plenumas la tradicie virinajn taskojn de flegado, servado kaj simpla ripeta laboro.

Mārtha Andréasson ♀ (merta) raportas, kiel la progresema sveda kompanio "Volvo" iniciatas programojn por larĝigi la profesiajn horizontojn de ĝiaj laboristinoj. Tamen, ankoraŭ virinoj apenaŭ troviĝas en ĝiaj plej altaj gvidantaj pozicioj.

La aŭtofabriko "Volvo", unu el la plej grandaj entreprenoj en Svedio, estas ankaŭ unu el la plej progresemaj - almenaŭ en la privata sektoro - rilate iniciatojn por egalrajteco inter viroj kaj virinoj. Ekzemple la virinoj povas partopreni kursojn i.a. en aŭtotekniko kaj en trejnado por memfido. Ĝio en pagata labortempo.

Kaj oni uzas t.n. "pozitivan diskriminacion" je difinitaj postenoj. Tio signifas, ke dum provperiodo oni dungas virinon al teknika ofico, se ŝiaj kvalifikoj estas sufiĉaj,

malgraŭ tio ke ekzistas viraj kandidatoj kun pli altaj kvalifikoj, ekzemple pli da sperto.

Tio estas revolucia iniciato por entrepreno kiel Volvo. Sed tamen estas malfacile por la virinoj havi rezultojn en la praktiko. Kial?


Se oni parolas kun la virinoj en Volvo, oni trovas, ke ili estas tute samopiniaj: "Ne la formalaj sed la psikologiaj malhelpaĵoj - ĉefe ĉe la viroj - estas la plej grandaj bariloj."

La virinoj diras, i.a., ke virino estas respektata pro sia metilerteco, nur se ŝi subpremas sian virinecon. Alie la viroj sentas sin minacataj. La viroj opinias, ke ina kolego profanas la prestiĝon de la laboro. Virinoj, kiuj ne faras la tradiciajn servajn taskojn estas de multaj viroj konsiderataj kiel iom strangaj, nevirinaj. Kontoristinoj servu la virojn, prefere ili simulu al la inoj en la viraj revuoj; sekse alloga sekretariino altigas la prestiĝon de la ĉefo inter la kolegoj. Sed la virinoj mem ne rajtas nek estas atendataj havi propran seksan instinkton.

Neniuj virinoj povas avanci en forte vir-regata entrepreno, se ne ekzistas viroj, kiuj subtenas ilin. Ne gravas kiel bona aŭ sperta estas virino - sen ĉefo aŭ viraj kolegoj, kiuj apogas ŝin, la virino venas nenien. Kaj tiuj viroj devas esti kuraĝaj kaj prefere ankaŭ havi potencon. Tial la laboro por egaleco altgrade devas okazi inter la viroj.

Volvo ankaŭ aranĝas seminariojn por viroj, kie la viraj ĉefoj ricevas la ŝancon revizii siajn sintenojn kaj antaŭjuĝojn pri virinoj. Eble tio estas same grava kiel kursoj por la virinoj en memfida evoluo.

Märtha Andréasson



Antaŭen kaj .

POPOLNOMBRADO

Laŭ la popolnombro de 1981, Hindu Unio havas 353 462 802 virojn kaj 330 347 249 virinojn. Tio signifas, ke estas 935 virinoj por ĉiuj 1000 viroj. (En 1971 la proporcio estis 930 kontraŭ mil.) S-ro P. Padmānābha, registaro Ĝenerala, kiu administris la nombradon, diris ke "apenaŭ ekzistas pruvo por subteni la opinion, ke oni intence neglektas inajn bebojn." Li aludis al ofta morto de hindaj patrinoj dum nasko kaj al laobleco, ke kelkaj malsanoj atakas virinojn pli ofte ol virojn. Pri leg- kaj skrib-kapablo oni konstatis, ke 46,74% de la viroj estas kapablaj kaj 24,88% de la virinoj. Entute, 36,17% de la loĝantaro nun povas legi kaj skribi, kompare kun 29,4% en 1971.

VOĈO por israelaj virinoj

La unua inisma revuo ekaperis en Israelo antaŭ nelonge. Ĝi nomiĝas "Noga" (Venuso en la hebrea), kaj estas kunmetita de grupo de dek unu virinoj el diversaj partoj de la lando. Unu el ili, kafele Ostrovic, arkitekto, diris: "Tiu estas revuo kiu montras la virinojn kiel ili vere estas, anstataŭ kiel la viroj ŝatus, ke ili estu." Ŝi aldonis ke la dek unu virinoj, el kiuj tri estas profesinoj en la kampo de ver-

kado kaj eldonado, volis proponi al la israelaj virinoj revuon malsimilan al la jam ekzistantaj revuoj por virinoj.

La unua numero de "Noga" estas financita parte per donaco de la usona organizaĵo "Virinoj por virinoj" kaj parte per reklamo. Ĝi akceptas nur anoncojn kiuj ne ofendas virinojn. En la komenco "Noga" aperos kvarfoje jare, sed oni celas ĝin aperigi ĉiamonate.

En la unua numero oni traktis la jenajn temojn: altaj kalkanumoj kiel simbolo de la endanĝerigo de la sano de virinoj por beleco, mallonga rakonto pri la edziniĝ-nokto de virino el Jemeno, kaj novaĵoj pri evoluoj kiuj interesos virinojn en Israelo.

PROCESO prokrastita

Estas prokrastita la proceso kontraŭ dek unu virinoj en Bilbao, Hispanujo, kiuj estas akuzitaj pri abortigo. Jam plurfoje la proceso estis prokrastita. Ĝi devis okazi en junio.

Temas pri malriĉaj virinoj el malalta socia tavolo, kiuj uzas trikilon aŭ sapon por kaŭzi aborton. Unu el la akuzitoj estas la abortigistino mem. En Hispanujo abortigo estas ĉiam kontraŭleĝa, same kiel la uzo de kontraŭnaskaj rimedoj. Tiu malpermeso datas el la tempo de Franco (franko). Okazis provo ŝanĝi ĝin, sed la kontraŭstaro de multaj konservativuloj estis tiel forta, ke ĝi fiaskis. Kontraŭnaskajn rimedojn oni povas ricevi nur

per preskribo, sed multaj kura-
cistoj rifuzas preskribi ilin
pro religiaj motivoj.

Unu el la akuzitoj diris: "Ni
virinoj ne abortigas pro ple-
zuro, aŭ ĉar ni estas mal-
moralaj, sed pro neceso. En ĉi
tiu lando ankoraŭ multaj homoj
vivas en la mez-epoko, sed al-
venis tempo kiam la virinoj mem
decidu, kiom da infanoj ili
volas naski."

TEJO-komitato

Ĉiam pli da inoj estas nomataj
de la landaj sekcioj de TEJO
por fariĝi anoj de ĝia komitato.
Pasintjare estis iom pli ol 35%,
ĉi-jare jam 43%. Estos interese
konstati, ĉu finfine tiu
evoluo penetros ankaŭ en la pli
aktivan flankon de la TEJO-
komitato, t.e. estraranoj kaj
komitatanoj B (kiuj estas elek-
tataj ne de la landaj sekcioj
sed de la aliaj membroj de la
komitato). Spertebliis en Rauma,
kie amasis la inoj en la komi-
tato, ke tamen preskaŭ nur
viroj parolas.

NOVA Hite-raporto

Usona esploristino, Shere Hite
(ŝir hajt), kiu faris sisteme
faman studon pri la virina seks-
konduco (The Hite Report on
Female Sexuality), finis novan
libron pri la vira seks-konduco.
Ĝi baziĝas sur pli ol 7000
respondoj al 168 demandoj.
Inter la plej gravaj konkludoj
de The Hite Report on Male
Sexuality estas ke:
- viroj ne ŝatas troige "vir-

ecan" sinprezenton, kaj opinias,
ke viro kiu agas tiel estas
emocie malsekura;
- la plejmulto da viroj opinias
ke virinoj ne volas amori
sufiĉe ofte;
- 90% de la respondintoj ĝuas
masturbadon;
- 76% de la viroj edziĝintaj
antaŭ du ĝis kvin jaroj foje
estas sekse malfidelaj al la
edzino.

RIPOZO por virinoj

Konsterno ĉe Sabena (la belga
nacia flugkompanio): la leĝo
devigas virinojn ripozi almenaŭ
11 horojn inter du laborperio-
doj. Tamen la horaro ne ĉiam
permesas ke la deĵorantoj tiel
longe paŭzu inter flugoj. Kion
fari? Ĉu uzi nur virojn por
difinitaj flugoj aŭ ĉu mal-
atenti la leĝon?
La problemo solviĝis helpe de
la Komisiono pri Virina Laboro.
Ĝi proponas ŝanĝi la leĝon por
permesi escepton ĉe la virinaj
dungitoj de transportkompanioj.

Redaktis ĉi tiun rubrikon
♀ Loes Demmendaal (lus
demendaal), Ned.

Informojn provizis: ♂ Probal
Daŝgupto, Hind.; ♀ Judith
Junger, Ned.; ♂ Thomas Bormann,
FRG; ♂ Yves Bellefeuille (iv
belfej), Kan.



TRA LA MONDO



Ĉinujo

La rajtoj de la virinoj en Ĉina Popola Respubliko estas reprezentataj de Ĉina Virina Federacio (ĈVF). Kiel protektanto de la virinaj intereso, tiu federacio kontrolas la registaron en ĝia efektivigo de la leĝoj, kiam ili rilatas al virinoj. Interesa artikolo pri ĈVF aperis en la marta numero de El Popola Ĉinio.

Laŭ la artikolo, ĈVF estis fondita en 1949, do antaŭ la Ĉina ŝtato mem. En ĉiu kvina jaro okazas la Tutlanda Virina Kongreso kaj inter kongresoj funkcias la Konstanta Komitato de ĈVF. Ĝi havas diversajn fakojn, ekz. internaciajn rilatojn, enlandan laboron k.a., kaj ankaŭ eldonas la gazeton Ĉinaj virinoj en la ĉina kaj angla lingvoj.

Ĝia ĉefa tasko estas mobilizi la virinojn, por ke ili kontribuu al la konstruado de moderna lando. Pli konkrete, ĝi provas liberigi ilin de hejmastrumaj laboroj; okupiĝas pri la edukado de infanoj kaj gejunuloj; instruas al la virinoj socialisman sintenon al demandoj pri amo, geedziĝo, familio kaj moralo; kaj starigas amikajn kontaktojn kun virinoj kaj virinaj organizaĵoj en aliaj landoj.

La Federacio ofte intervenas ĉe registaraj departamentoj en la intereso de virinoj, ekz. kiam temas pri dungado, provizado de infanvartejoj, diskriminacio ktp. Pasintjare ĝi traktis problemon, kiu memorigas pri similaj kazoj en aliaj landoj. Ekzistas multaj senlaboraj gejunuloj en Ĉinujo, el kiuj la plimulto estas virinoj. Iuj proponis, ke la virinoj okupiĝu pri hejmastrumado por ke pli da junaj viroj ricevu laboron. ĈVF kontraŭstaris tiun ideon kaj la registaro aprobis ĝian vidpunkton.

Granda problemo de la ĉinaj virinoj, kiel de virinoj en multaj aliaj landoj, estas la domtaskoj. Ĝenerale, ambaŭ geedzoj faras tiujn taskojn, tamen la edzino dediĉas al ili pli da tempo ol la edzo. En la kamparo ŝi ofte devas prizorgi ankaŭ la privatan parcelon. Por faciligi la situacion, la registaro disvastigas sociajn servojn: vendejoj, manĝejoj, infanĝardenoj ktp.

Laŭleĝe, la virinoj ĝuas egalrajtecon kun la viroj en ĉiu sfero de la vivo. Praktike la registaro ellaboris konkretajn rimedojn por realigi tion. Ĝenerale ĝi sukcesis; tamen, ne estas facile forigi tradiciajn sintenojn el la feŭda pasinteco, precipe en la kamparaj regionoj. Tie ankoraŭ troviĝas senproportia respekto al la viroj kun kontrasta malestimo de la virinoj. Foje en izolitaj vilaĝoj eĉ okazas ankoraŭ deviga edziniĝo, en kiu la virino estas traktata kiel komercaĵo.

Ĉi tiu intervjuo elektis elstarigi la restantajn problemojn de la ĉina popolo pli ol ĝiajn atingojn. Kompreneble, ne eblas ŝanĝi la sintenojn de jarcentoj en unu generacio. La artikolo kritike alfrontas la situacion en maniero, kiun mi persone trovas pli esperiga ol estus senbaze pozitiva prezento.

ab

Germana DR

● Mi kolektis kelkajn statistikajn indikojn pri la esperantistaro de GDR, kiuj indus pluan esploron. Inter la aktivaj membroj estas 37% virinoj. Mi konstatis, ke en niaj agrikulturaj distriktoj relative multaj virinoj agas per kaj por Esperanto (ĝis 56%), dum en la industriaj centroj abundas viraj esperantistoj (ĝis 83%). Klarigon mi ankoraŭ ne havas.

Inter la virinoj du trionoj estas senedzaj (fraŭlinoj, divorcintoj, vidvinoj). Inter la viroj nur unu triono estas senedzina. El tio oni povas konkludi, ke virinoj, pro

familiaj devoj, ne trovas tempon por Esperanto. Oni devus krei eblecojn, kiuj ebligus al patrinoj partopreni nian movadon (ekzemple kursojn dum la lernejaj ferioj, en ferioj por la tuta familio). Oni ankaŭ povas konkludi, ke senedzaj virinoj serĉas grupan kontakton (kion senedzinaj viroj ja ofte serĉas en bierejo) kaj serĉas valoran, interesan okupiĝon (ekzemple Esperanton). Oni do povus varbi celante la senfamiliajn homojn.


Laŭ mia statistiko sammulte da viroj kiel virinoj lernis Esperanton en koresponda kurso, en popola vesperlernejo aŭ en niaj kulturligaj kluboj (la Esperanto-asocio en GDR estas sekcio de la amasorganizaĵo Kulturligo). Granda diferenco estas, ke 33% el la viroj indikis "memstudado", sed nur 15% el la virinoj. Verŝajne la dommastrinaj devoj ne permesas al virinoj sidi trankvile kaj lerni lingvon. Ili bezonas liberigon el la hejma sfero. Tiun supozon subtenas ankaŭ tio, ke en la Esperanto-seminarioj de Kulturligo partoprenas meze 43% virinoj, kiuj do pli ol kutime aktivas en niaj vicoj.

● Nia ŝtato garantias egalrajtecon laŭ bazaj principoj. Tamen la virinoj malegale praktikas ĝin. La plejmulto tre volonte dediĉas sian forton al la familio, al la infanoj.

En nia lando 87% el la laborkapablaj virinoj laboras profesie. Estas granda merito de la virinoj ligi la devojn de patrino kun aktiva partopreno en profesia kaj socia agado. Virinoj kapablas des pli aktive kunlabori, ju pli la ŝtato agnoskas kaj subtenas ilian duoblan funkcion. (Tio okazas ĉe ni ekzemple per parte pagata libertempo por la flegado de beboj ĝis unu jaro, mallongigita labortago por virinoj kun du infanoj aŭ pli, plivastigado de la reto de infanvartejoj, salajrata studado en fak- aŭ alt-lernejoj ktp.)

Tiuj subtenoj estas rajtoj malegalaj por viroj kaj virinoj. "Egaleco" ne sufiĉas. La virinoj bezonas fortan subtenon por plenvalore partopreni ĉiujn sociajn agadojn. Tio ankaŭ validas por la esperantistaro. Per speciala subteno ni havos pli da inaj membroj, inter kiuj ni trovos estonte gvidantajn funkciulininojn kun tiom da praktikaj spertoj kiom nun havas ĉefe viroj.

Linde Knöschke ♀ (kneŝke), GDR



Inisma kulturo, ĉu dezirinda?
Tio ja implicus pli ol egalecon
kaj tion ni ne postulu! Kial?

La homa socio laŭnature estas
miksita socio - do parte vira
kaj parte virina. Tiu ekvilibro
estas rompata, kiam viroj ĝuas
pli da rajtoj ol virinoj kaj
inverse. Ni klopodu atingi kaj
konservi la harmonian ekvilibron:
Ni - viroj kaj virinoj - kune
laboru kaj dividu la avantaĝojn
kaj malavantaĝojn de la tera
vivo!

Komuna streĉo de la fortoj por la bono de la tuta homa socio
ja ne ekskludas, ke laŭbezone oni apartigu. La virinoj inter
si traktu virinajn problemojn kaj interesojn, same kiel la
viroj pritraktu la siajn.

Oni ne troigu en la batalo pri egaleco - tio detruos la
naturan harmonian ekvilibron! Egaleco en miksita socio, kiu
baziĝas je reciprokaj agnosko kaj estimo, estu nia celo!

Ĉiu laŭ siaj fortoj kaj kapabloj! Oni kreu cirkonstancojn,
kiuj ebligas la egalajn edukon kaj disvolvon de ĉies kapabloj!

Hella Sauerbrey♀ (saŭrbraj), GDR

Estas pozitiva evoluo, ke en Esperantujo tiom da virina agado
okazas, ke oni per tio povas plenigi preskaŭ tutan numeron de
SkE (n-ro 4). Sed mi forte kontraŭas, ke oni tion fakte
faras! La titolon de la revuo mi komprenas kiel "Sekso kaj
Egaleco en la MONDO" kaj ne kiel "Sekso kaj Egaleco en
Esperantujo"! Kial estigi lingvan komunumon, kies celo estas
plifaciligi inter-nacian komunikigon, kaj poste paroli ĉefe
aŭ nur pri la problemoj en tiu lingva komunumo, anstataŭ
utiligi tiun lingvon por transpaŝi lingvajn limojn komunik-
ante ion interesan ankaŭ por eksteruloj, ion ĝenerale gravan?

Tiu kritiko sin direktu ne nur al SkE. Mi apenaŭ kuraĝas
diri antaŭ neesperanto-parolantoj, ke niaj du plej grandaj

kaj renomaj revuoj, Esperanto kaj Heroldo de Esperanto, dediĉas siajn paĝojn preskaŭ nur al la esperantismo. Kial ili lernu tian lingvon? Ĉu ni vere estas plejparte "esperantistoj", do adeptoj de esperantismo, kaj ne simplaj uzantoj, Esperanto-parolantoj? Ĉu ni meritas Monato? Mi esperas!

Lu Wunsch-Rolshoven ♂ (vanŠrolshofn), Mondo

Mi permesas min skribi al vi pri la nenaskitaj infanoj. Ankaŭ hodiaŭ mi admiris ses-monatan knabineton pezantan 1050 gramojn! Oni rigardis ŝin per speco de televido, kiu montras ŝian spiradon kaj korbatojn, sed ŝi jam esprimis siajn personajn impresojn per plorado. En mia akuŝejo tio estas nemalofa kazo, kaj foje mi savas pli malpezajn infanetojn.

Sed ni havas en nia kliniko ankaŭ neŭropsikologian porvirinan sektion. Kiel romkatolika animumzorganto mi renkontas tie multajn travivaĵojn de la virinaro. Kaj ĝuste pro tio mi abonis SkE.

Mi estas sentema al la sufero de ĉiu persono kaj de ĉiu estaĵo, kaj klopodas respekti bestojn kaj plantojn. Virino kiu profesie flegas plantojn rakontis al mi pri la reago de plantoj al la amo de la fleganto kaj al la muziko.

Sed mi speciale volas respekti la nenaskitajn personojn, kiel vivantojn, kiel homojn kaj kiel elektulojn de Dio. Mi memoras la vorton de angla socialistino, al kiu mi demandis: "La unua rajto de la virino?" "Naskiĝi!", ŝi diris.

Louis Muller ♂ (lui), Belgujo

Legante SkE mi trovis tre danĝeran (laŭ mi) sciigon. S-ino J. Sadigi el Irano skribis (n-ro 5) pri la pronomo ri: "Kiam mi ree vidis ĝin en SkE, mi komencis uzi ĝin en miaj kursoj kaj rekomendis ĝin al ĉiuj Esperanto-instruistoj, ĉar mankis al ni pronomo egalseksa."

Mi opinias, ke ŝi agas kontraŭ la Fundamento de Esperanto. Kiel aspektus nia lingvo ("nia kara Esperanto", kiel en alia loko ŝi nomas ĝin), se ĉiu nacio klopodus ŝanĝi la lingvon kaj tiel plifaciligi ĝin? Genia Zamenhof tion antaŭvidis

kaj pro tio lasis la Fundamenton.

... mi opinias, ke estas ankoraŭ tro frue por decidi la aferon. La danĝero de ŝia agado estas, ke ŝi jam instruas ĝin, kvazaŭ ĝi estus jam oficiale akceptita. Imagu, ke ŝiaj kursanoj partoprenus iun internacian aranĝon kaj komencus diri "ri". Kiu komprenus ilin? Mi konstatas, ke ofte la fervoreco povas esti danĝera.


Mila van der Horst-Kolińska ♀, Nederlando

Mi volas partopreni la diskuton pri la pronomo en la singularo, la tria persono. Certe ne nur en la hungara sed en multaj lingvoj troveblas tiu pronomo kiu mankas ankoraŭ en Esperanto! Mi ne scias kial Zamenhof ne kreis tiun, ĉar ĝi estas necesa, sed tute ne pro tio ke ne estas emancipado! Ĝi necesas, ĉar oni ne povas ĝin anstataŭi, eĉ tute ne estas solvo uzi iun ajn personan pronomon: li aŭ ŝi.

Mi opinias, ke tiu rekomendita formo ne estas bona, laŭ kiu oni uzas ambaŭ - liŝi -, ĉar tiam oni ĉiam devas pensi pri tiu persono kiu antaŭstaras, do ĉu liŝi aŭ ŝili. Ĉiu ajn literokombino taŭgas, kiu ne montriĝas konfuzebla. Kaj ankaŭ mi proponas unu solvon. Estu por ambaŭ personoj nur unu litero i, kiel ankaŭ en la hungara estas por tio nur unu litero ő, nek li, nek ŝi, sed iu ajn el la du eblecoj.

Jozefo Dudaš ♂, Hungarujo

NI LABORAS...



por produkti numeron
de SkE. Pruva al ni,
ke tia laboro valoras.
Se via abono finiĝas
per ĉi tia numero,

REABONU!

Claudia Fonseca

AVUJAN estas la juna kaj sana ĉefo de vilaĝo kun 1400 loĝantoj. Antaŭ nelonge li havigis al si duan edzinon, kun kiu li pasigas ĉiujn liberajn momentojn. Kiam li estis juna, li laboris en la plantejoj de Ganao, kaj malgraŭ sia nuna okupiteco pro respondecoj de ĉefo, funde, kiel la majoritato de la viroj, li estas kultivisto.

■ Kiel knabino edziniĝas?

La patro de la knabino elektas la edzon, sed demandas la opinion de sia edzino. Se tiu ĉi havas bonan kialon por malakcepti, ŝi rajtas tion fari. Kompreneble, oni demandas ankaŭ de la knabino kion ŝi opinias, sed se la du gepatroj akordiĝas kaj la filino rifuzas, ekestas komplikaĵoj.

Kiam knabino komencas formiĝi kaj la junuloj ŝin rigardas, estas tempo trovi por ŝi edzon. Promesi tro frue filinon ne estas bona ideo, ĉar ŝi havas plurajn jarojn antaŭ si por juĝi sian promesiton, kaj fine ŝi povas rimarki, ke li ne plaĉas al ŝi. Tiam estas tre malfacile redoni la dotaĵon kaj trankviligi la junulon. Sed se knabino havas ĝustan aĝon kiam oni promesas ŝin al viro, ŝi povas naski infanon ĵus edziniĝinte, kaj tiam ŝi ne forlasos facile la edzon.

■ Kial oni eksedziĝas?

Se viro petas de la edzino ion fari por li, kaj ŝi rifuzas, li komencas pensi, ke io ne funkcias kaj ĉu ŝi trovis alian viron. Je la tria rifuzo, ekestas kverelo kaj fine, probable, ŝi reiros ĉe sian familion aŭ foriros kun alia viro.

Se viro petas de la edzino fari laboron tro pezan por virino, ŝi povas protesti, sed fine faras. Se li tion repetas, la

postan tagon, kaj ŝi estas tro laca, ŝi povas reiri ĉe siajn gepatrojn, kaj ili konsideros ŝin prava.

Se viro ofte batas sian edzinon, intervenos la gepatroj por juĝi, kiu el la du malpravas. Se la viro kulpas, oni forprenos la virinon de li. Se kulpas la ino, ŝi povas resti kun la edzo, post skoldado de ŝia familio.

■ Kiel decidus vi kaj viaj edzinoj pri grandaj elspezoj?

Virino kiu gajnas vendante ĉe la bazaro tenas la tutan monon por si aŭ donas parton al la edzo por helpi lin en granda aĉeto. Sed la edzo ne povas ŝin devigi al tio, se li antaŭe ne financis la starigon de la komerco. Virino povas aĉeti brutojn por donaci al la gefiloj, sed malofte okazas, ke ŝi estas tiom riĉa. Cetere tio estas tute ne dezirinda, ĉar tiam ŝi ne plu havus respekton al sia edzo.

La edzo kaj la edzino ĝenerale diskutas kune la gravajn elspezojn, ekz. por radio aŭ plugilo. La virino ĉiam scias kiam la edzo volas ion aĉeti, ĉar tiam li petas ŝin porti la milion al la bazaro, kaj se la mili-rezervo estas abunda, ŝi demandas: "Kial vi petas min vendi milion ĉiutage? Ĉu vi volas ion aĉeti?" Kaj li klarigas, kaj ŝi respondas, "Bone". Se, male, la rezervoj reduktiĝas, ŝi diras: "Kial vi volas vendi tiom da milio por aĉeti radion? Fine ni ne havos por manĝi ĝis la nova rikolto".

■ Kiu decidus, kiuj geknaboj, viraj aŭ inaj, vizitu la lernejon?

Normale estas la patro, kiu okupiĝas pri tio, ne la patrino. Sed li ne enskribigos la infanon ĉe la lernejo sen antaŭe tion diri al la patrino. Se ŝi havas bonan kialon por ĝin ne sendi al la lernejo, ŝi diras. Ĉi-jare mi sendis al la lernejo en la urbo kvin infanojn. Unu el la filinoj estis tro aĝa, sed la aliaj kvar, du viroj kaj du inoj, estis akceptitaj. Estas bone lernigi la knabinojn kiel la knabojn, ĉar tial ili povas trovi bonan laboron aŭ edziniĝi al dungito. Ĉiuokaze, la familio gajnos el tio ĉar ŝi aŭ ŝia edzo portos hejmen belajn donacojn aŭ foje monon.

Artikolo el Unesko-kuriero aŭg-sep. 1975
tradukita de Christina de Giorgi ♀ (kristina de Giorgi)

ROKSANO

forĝesita feministino

Bernard Golden ♂, Hungarujo

Mia kviz-rubriko "Ekzameno E", aperinta en la aprila numero de Esperanto (1978), temis pri virinoj, kiuj ludis gravan rolon en la Esperanto-movado. Pro la karaktero de la rubriko, ne estis eble detale pritrakti la agadon de tiuj verdstelistinoj, kelkaj preskaŭ tute forĝesitaj, aliaj ankoraŭ memorataj. Kiom da legantoj de la rubriko sukcesis identigi ĉiujn dek virinojn per la donitaj informoj? Mi estas certa, ke faris tion nur malmultaj esperantistoj, tiuj havantaj apartan intereson pri la historio de la movado.

Estas substrekende, ke unikaĵo de la Esperanto-movado, kontraste kun aliaj planlingvaj movadoj kaj movadetoj, estas la nombro da virinoj, kiuj partoprenis en ĉiuspecaj agadoj ekde la fruaj jaroj. Tamen estiĝas jena demando: kiom da tiuj entuziasmulinaj de la unuaj jardekoj de la 20a jarcento havis daŭran influon sur la movadon kaj la evoluon de la lingvo? Kiom da verkoj de tiuj, kiuj dediĉis sin al la beletro, estas legindaj kaj legataj nuntempe, aŭ eĉ konataj nur laŭtitole? La "Reĝino" de la Floraj Ludoj⁺ en 1909 estis Marie Hankel, kiu aperigis siajn versojn en periodaĵoj kaj en aparta volumo, sed kie estas eble legi ilin hodiaŭ? Eĉ unu poemeto de ŝia plumo ne estas inkludita en Esperanta Antologio. La virinoj, kiuj aktivis sur la organiza tereno de la movado lasis eĉ malpli videblajn spurojn, kvazaŭ ili ne ekzistus. Ricevinte taskon de la redaktorino de Sekso kaj Egaleco verki artikolon pri Roksano, mi baldaŭ konstatis, pro la manko de donitaĵoj pri ŝi en nuntempe haveblaj konsultlibroj, ke estas eble akiri nur malnetan bildon pri ŝi kaj ŝia agado. Ĉiuj fontoj ripetas la samajn informojn, preskaŭ samvorte, ĝistede. Jen la magraj detaloj.

Roksano estas la pseŭdonimo de Jeanne Flourens (ĵan fluró), francino, kiu naskiĝis la 4an de aŭgusto, 1871, en Vias apud

⁺Esperanta poezia konkurso okazanta en Hispanujo.

Montpellier. Si restis fraŭlino, perlaborante vivrimedojn kiel komercistino en Provenco. Dum kelkaj jaroj ŝi loĝis en Béziers; en 1922 ŝi transloĝiĝis al Marsejlo. Esperantistiĝinte en 1903, Jeanne Flourens fondis grupon en Béziers kaj en 1910 fariĝis membro de la Lingva Komitato. Ŝi estis tre aktiva en la tiutempa franca Esperanto-movado, gvidante kursojn kaj verkante propagandajn artikolojn, inkluzive franc-lingvajn por lokaj gazetoj. Sub la kaŝnomo Roksano ŝi kontribuis beletraĵojn kaj alitemajn verkojn al pluraj Esperantaj periodaĵoj: L'Espérantiste de Louis de Beaufront, Juna Esperantisto de Edmond Privat kaj Hector Hodler, kaj Tra La Mondo de Capé-Montrosier estis la plej gravaj. Cetere, ŝi mem fondis kaj redaktis du revuojn: Tra La Filatelio (1908-1913) kaj Interŝanĝo - L'Échange (1919-1922).

Kiel literaturisto ŝi aliĝis al Esperantista Literatura Asocio (ELA), fondita en 1911 fare de diversnaciaj tradukistoj kaj verkistoj celantaj doni bonan direkton al la evoluo de la literatura lingvo. La anoj reciproke ekzamenis siajn manuskriptojn antaŭ presigo, por ke ili ne deviu de la pura zamenhafa lingvouzo. Roksano efektive fariĝis la plej fama reprezentanto de kontraŭneologisma sekto (la skolo de Théophile Cart), kies dogmo estis ĝisosta Fundamentismo.

Jeanne Flourens okupiĝis pri du literaturaj ĝenroj, la dramo kaj la novelo. Ŝiaj teatraĵoj estas komedioj kun amuza intrigo. "Duonsurda", duakta komedio, aperis unue en Tra La Mondo (1907); la dua eldono estis publikigita en 1922. La sekva teatraĵo, "La Fianĉiniĝo de Sovaĝulineto" en tri aktoj, same havis du eldonojn, la unuan en Tra La Filatelio (1909) kaj la duan broŝurforme en 1922. La recenzinto de La Revuo (februaro 1910) favore taksis ĝin, dirante, ke ĝia stilo "faras ĝin vera ĉefverketo. Ĉio estas laŭdinda en ĝi: la originaleco de la karaktero, strangeco de la situacio, rapida malvolviĝo de la okazaĵoj, ĉiam kreskanta konkludo, tute-natura kaj logika ... esperantaj prozaĵoj absolute imitindaj." Tria dramo de Roksano estas la triakta "Ĝeozopeto" (1913). Ŝi verkis ankaŭ dialogon titolitan "La Morgaŭa Virino" (1912) kaj tradukis "Kaprico" de Alfred de Musset; ŝi aperis en Tra La Mondo en 1908. La prozan tradukon "Mia Onklino Tatiana Aleksandrovna - eltiraĵo el la memorskriboj de Tolstoj" Roksano mem eldonis en 1911, same kiel kelkajn el la ĉi-supre menciitaj verkoj. Ŝia novelo originale verkita en Esperanto,

"La Senlaca Sinofero" (1912), estis premiita en konkurso de Belga Esperantisto. Ankoraŭ unu' recenzo en La Revuo (januaro 1913) laŭdas la stilon, kiu estas bela pro la beleco de la sentoj: "La beletrista vagabondino Roksano ne tradukas, la penso elflugas el ŝia cerbo tute Esperantigita."

Esperantistoj, kiuj hodiaŭ avidas legi ion de Roksano, povas trovi en 33 Rakontoj, antologio de Esperantaj noveloj, la verkon "Doktoro Nekelmo", publikigitan la unuan fojon en la rusa revuo La Ondo de Esperanto. La biografia noto en tiu novelaro diras pri la aŭtorino: "El ŝia riĉa fantazio ŝi ĉerpis romantikajn - iom ekstremajn temojn." Laŭ Esperanto en Perspektivo la noveloj de Jeanne Flourens estas "nun eksmodaj, romantikecaj kaj iom naivaj." Malgraŭ tio, alia citaĵo el 33 Rakontoj informas, ke Roksano "havis larĝan horizonton kaj okupis sin pri problemoj - la virina egalrajto k.c. - kiuj generale ne tre incitis la fantazion de la tiutempaj Esperanto-verkistoj."

Jen, tre skize prezentita, la esenco de Jeanne Flourens/Roksano. Nun la ĉefa demando, kiun oni emas fari estas: ĉu ŝi vere estis serioza batalantino en la movado por virina egalrajteco? Si propagandis tiun temon en siaj komedioj, kvankam tragedioj estas pli konvena teatraĵa formo por prezenti la problemaron. Roksano lanĉis du periodaĵojn, unu pri postmark-kolektado kaj la alian pri kiu-scias-kion, sed ŝi ne fondis iuspecan fruan version de Sekso kaj Egaleco. Kial?

Post sia ekloĝo en Marsejlo, Jeanne Flourens fariĝis la direktoro de Esperanto-Hejmo en tiu urbo. Ŝi mortis la 13an de julio 1928 kaj glitis, nerimarkite, en la abismon de forgeso.

Novajo de KVA:

SUBVENCIO POR INFORMA MATERIALO

Subvencio de 500 gld. por la eldonado de nacilingva informmaterialo estis asignita al la Komisiono pri Virina Agado de UEA dum la maja kunsido de Instituto Hodler. KVA prilaboras tekston de flugfolio por tradukado kaj presado en kelkaj naciaj lingvoj.

NE RISKU INTERROMPON!

Via abono al Sekso kaj Egaleco finiĝas per ĉi tiu numero. Se vi trovis ĝin utila kaj interesa dum la pasintaj monatoj, vi sendube volas plu ricevi ĝin. Do nepre ne risku ĝenan interrompon en la sendado de via ekzemplero: pagu TUN vian rean kotizon por la venonta jaro!

Ne forgesu, ke la internacia poŝto estas foje malrapida, kaj ke ofte okazas prokrastoj ĉe transsendo de pagoj. Tial ni konsilas, ke vi jam nun prizorgu la aferon, antaŭ ol vi forgesos!

Elektu el la ĉi-suba listo la pag-rimedo(n), kiu plej oportunas por vi, kaj sciigu vian elekton al nia redakcio en Rotterdam (prefere uzante la ĉi-suban slipon). Tiel, se via pago iel perdiĝos, nia administracio povos priserĉi ĝin.

PAGRIMEDOJ

Vi povas pagi:

■ Per internacia poŝtmandato por 12,00 nederlandaj guldenoj, aŭ per 15 internaciaj poŝtaj respondekuponoj, al Anna Brennan, p/a Nieuwe Binnenweg 17B, 3021 GA Rotterdam, Nederlando

■ Per poŝtĝina transpago al jenaj poŝtĉekkontoj:

brita 12 463 0006 je nomo de Dermot Quirke (£3,00 sterlingaj)

japana 0-0-311 Tokio je nomo de Mukunaga Makiko (1500 enoj)

nederlanda 4412211 je nomo de Anna Brennan (12,00 ned.gld.)

norvega 5 73 61 29 je nomo de Margrete Landmark (30 nor.kr.)

usona 22 01 05 4880 je nomo de Martha Anderson (25 usd.)

■ Per sterlinga ĉeko (£3,00) je nomo de Dermot Quirke

■ Per uson-dolara ĉeko (\$6,50) je nomo de Charles Power

■ Per alivaluta ĉeko egalvalora al £4,00 je nomo de Dermot Quirke

■ Per alispeca pago al via landa peranto (vidu paĝon 2 de SkE)

■ Per pago de 14,50 ned.gld. pere de Universala Esperanto-Asocio

■ Per alia rimedo laŭ antaŭa konsento kun la redakcio de SkE

SCIIGO AL LA REDAKCIO DE SkE

Al Anna Brennan
p/a Nieuwe Binnenweg 17B
3021 GA Rotterdam, Nederlando

Mi volas reaboni al Sekso kaj Egaleco, kaj tial:

mi kunsendas pagon

mi pagas aparte laŭ jena rimedo:

Mi ne volas reaboni pro jena kialo:

Nomo kaj adreso (PRESLITERE):

INTERNACIA ĈENLETERO POR PACO KAJ MALARMADO

Al ĉiuj virinoj en la mondo!

Malrapide ni, virinoj, vekigas. Kio okazas ĉirkaŭ ni?

Post la Dua Mondmilito 146 el 150 landoj membriĝis al la Unuiĝintaj Nacioj kaj devigis sin estonte vivi en paco kaj amikeco unu kun la alia. Dum la lastaj 30 jaroj entute okazis 6000 interparoloj por malarmado. Kaj kio estas la rezultato?

Jam nun estas sufiĉe da atomarmiloj por detruiri la mondon 40-oble. Kaj ankoraŭ ĉiam ne sufiĉas. Po minuto registaroj elspezas du milionojn da guldenoj por armilaro. Dum ĉiujare milionoj da homoj mortas pro mizero. La politikaj gvidistoj do ne sukcesis zorgi por vivebla mondo. Sed virinoj apenaŭ aktivis en tio. Kaj virinoj konsistigas la duonon de la homaro. Leviĝu do ni, kune kun ĉiuj maltrankvilaj viroj, kaj diru ni, ke sufiĉas. Se sufiĉe da ordinaraj homoj en la tuta mondo agas tiel, tiam neniu registaro povas malatenti tion. Kaj estas nia plej lasta ŝanco por preventi mondkatastrofon. Tio ĉi estas ankaŭ la konkludo de la lasta raporto de U.N. pri la vetarmado.

Estas la intenco ke tiu ĉi ĉenletero ekmarŝu en kiel eble plej da landoj en la Oriento, Okcidento kaj la Tria Mondo, pro la organizado de virinpacmovadoj.

Ni petas al vi kopii ĉi-suban tekston kaj sendi ĝin al:
Kurt Waldheim, United Nations, New York, 10017 New York, Usono

Al la Unuiĝintaj Nacioj,

Mi faras al mi grandajn zorgojn pri la situacio en la mondo. Mi sentas min ne ŝirmata de ĉiuj tiuj atomarmiloj kaj aliaj armiloj. Fortimigo kelktempe povas preventi militon, sed ne realigi daŭran mondpacon. Mi opinias, ke ĉi-momente la vetarmado en si mem signifas la plej grandan danĝeron por la homaro. Mi deziras, ke ek de nun vi faru ĉion eblan por atingi interkompreniĝon kaj amikecon inter la popoloj, tutmondan senarmigon kaj pli justan dividon de la prospero.

subskribo(j)

Nacilingvan tradukon vi sendu al landa "Virinoj por paco"-movado, aŭ alia landa pacmovado aŭ al "Vrouwen voor Vrede", Nassaulaan 31, 9717 CG Groningen, Nederlando, kiu je U.N.-malarmadotago, je la 24a de oktobro 1981a prezentos ĉiujn leterojn al la registaroj ĉie en la mondo.

Vi bonvolu en malpli ol 10 tagoj post ricevo de tiu ĉi papero multoblighi ĝin 5-oble kaj transdoni ĝin al 5 aliaj virinoj. Tiu ĉi letero atingu ĉiun minimume unufoje. Homoj kiuj ne tuj volas kunlabori, eble tamen decidus fari tion, post pripensado de la afero dum iom da tempo.

[Aldonaĵo al Sekso kaj Egaleco, n-ro 7, laŭ peto de Asocio de Laboristaj Esperantistoj 'FLE', p/a Doniastate 9, 7608 XJ Almelo, Nederlando.]